

STARTO

N-ro 1/2020 (274)

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



foto O.A. Fischer

**Somera Esperanto-Semajno (SES)
ĉi-jare okazos en Kroměříž,
kie ni kongresis en 2017**

☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio,
aperas 4-foje jare.

Asocia adreso: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, náměstí Míru 81/1, 568 02 Svitavy, **reta poŝto:** cea@esperanto.cz, ces@esperanto.cz.

Retpaĝaro de ĈEA: www.esperanto.cz
redakce@esperanto.cz

Identec-numero (IČ): 00 44 30 34

Starto retpoŝte: starto@esperanto.cz

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

Membrokotizoj: A 350 Kč (Starto elektronike 240 Kč), B 250 Kč (elektronike 140 Kč), C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: Cink: 400 Kč / 720 Kč (rete / normale); Marček: 600 / 800 Kč; Cink por progresintoj 600 / 1080 Kč. Aliĝoj: Jana Melichárková, Vacenovice 398, 696 06 Vacenovice, melicharkova8@seznam.cz

Libroservo: Muzeum esperanta, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, dvor.libuse@seznam.cz, marie.cumova@seznam.cz.

Sekcioj de ĈEA: katolika, kristana, blindula, grupo por ciferecigo (memstariĝis: handikapitoj, junularo, fervojistoj)

Komisionoj de ĈEA: pedagogia

Muzeo: muzeagrupo@esperanto.cz

Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj:

Dagmar Martinková, Chelčického 51, 568 02 Svitavy, martinkova.sy@seznam.cz, — sufiĉas sendi kopion, skanaĵon, ligan al la gazeta retejo

BANKO-KONTO de ĈEA:

2800 186 228/2010

Fio banka Svitavy

Komitato de ĈEA:

Prezidanto: Libuše Hýblová, Bohutín 136, 789 62 Olšany, tel. 774 928 974, libusehyblova@seznam.cz (gvidado, kunordigado kaj reprezentado de ĈEA, eksteraj rilatoj inkl. UEA, EEU)

Vicprezidanto: Jiří Tomeček, Dr. Bureše 3, 370 05 České Budějovice, tel. 602 611 584, tomecek@esperanto.cz (retejo, muzeo)

Kasisto: Vratislav Hirsch, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, tel. 517 444 117, vratislav.hirs@esperanto.cz (membro-datum-bazo, kontado)

Komitatano: Leonarda Chaloupková, K Panskému poli 160, 251 01 Světlá, tel. 732 415 094, leonarda.ch@seznam.cz (laboro kun kluboj kaj sekcioj, subvencioj)

Komitatano: Andrea Švubová, Brněnská 3474-32A, 695 01 Hodonín, tel. 604 850 689, a.svubova@email.cz (konferencioj, kongresoj, kunlaboro kun ĈEJ, subvencioj)

Komitatano kaj redaktoro de Starto: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 737 562 479, 530 319 263, miroslav.malovec@esperanto.cz (historio de la movado, kulturo, lingvaj konsultoj, ciferecigado, fakaj aplikoj, pedagogio)

Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio: Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobříchovice, tel. 257 712 201, chrdle@kava-pech.cz

UEA-kotizperanto: Ĉeĥa Esperanto-Asocio. La pagojn sendu al la konto de ĈEA (vidu paĝon "Jak platit svazu"). Administras: Petr Chrdle.

Esperanto-Muzeo en Svitavy: Ottendorfer-domo, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, muzeo@esperanto.cz
www.muzeum.esperanto.cz

Facebook kaj Ipernity

www.facebook.com/Esperanto.cz/

www.ipernity.com/home/esperanto-muzeo-svitavy

www.facebook.com/groups/esperanto.muzeo.svitavy/

www.facebook.com/muzeumesperantasvitavy/

Kontrollegis: la komitato, K. Votoček, V. Türk, P. Dvořáková

Estimataj gesamideanoj, karaj legantoj,

permesu al mi saluti vin nome de la estraro de ĈEA en la jaro 2020. Ni deziras al vi ĉiuj firman sanon kaj ke la nuna malfacila situacio finiĝu laŭeble plej frue kaj ne influu tro malbone niajn vivojn. La nunan komplikan situacion provu kapti por iom da trankviliĝo, pasigu la tempon ricevitan de malpermeso forlasi la domon kun viaj familianoj. Ĉiutage multaj el ni nur iradis labori, revenadis vespere, poste rapide ion purigis, kuiris, riparis kaj alian tagon denove, laboro, aĉetado, zorgoj ... Nun ni ricevis pli da tempo por ni mem, do ripozu, parolu kun viaj familianoj, kaj kiu havas eblecon, ĝuu vian ĝardenon, kie jam nun eblas lasi sin karesi de la suno. Ke vi ne havas ĝardenon? Ankaŭ mi ne, do ni laŭeble plej ofte malfermu fenestrojn por senti freŝan aeron.

Kiel vi povas rimarki ĉi tie en Starto kaj ankaŭ en ĉiuj E-retejoj, multaj E-aranĝoj devas esti en la tuta mondo bedaŭrinde nuligitaj. Mi ĝojis, kiel multaj ni renkontiĝis dum la kongreso de ĈEA en Brno okaze de la 50-jariĝo de nia asocio kaj dankas al vi pro tio denove. Kaj mi volis esprimi, kiel mi ĝojas, kiom multaj el vi decidis partopreni en lingva seminario nove en Malá Skála, bedaŭrinde tiu devis esti nuligita. Sed tio ne signifas, ke ni devas lasi Esperanton ĝis kiam la situacio trankviliĝos, ĝis denove estos aranĝoj kaj kursoj, ktp. Estas tempo por legi, do legu libron en Esperanto. Kaj se vi ŝatas konkursi, vi povas partopreni en Esperanto sumoo, kiu daŭras ankaŭ en la jaro 2020. Informojn vi trovos ĉe <http://www.esperanto-sumoo.pl/>. Se vi hazarde havas neniun libron en Esperanto, vi povas iun aĉeti ekz. ĉe libroservo de ĈEA, en butikoj de EK Brno aŭ ĉe eldonejo KAVA-PECH. Helpe de tiu eldonejo vi ankaŭ povas senpage ekzerci vian Esperanton ĉe <https://kava-pech.cz/procvicujsiesperanto>. Pliajn eblecojn por praktiki Esperanton vi trovos ĉe edukado.net, lernu.net, sed certe eblas trovi pliajn. Kaj bona ebleco por praktiki Esperanton estas ankaŭ voki viajn E-amikojn. Nunaj teknologioj ebligas al ni paroli kune eĉ senpage pere de diversaj aplikaĵoj, kun tiuj povas helpi al vi iu via familiano. Voku viajn eksterlandajn geamikojn, se vi ne havas, trovu novajn, pere de tiuj aplikaĵoj tio eblas, aŭ simple voku viajn ĉeĥajn E-geamikojn, sed alparolu ilin Esperante.

Kaj ne nur vi, kiuj jam regas Esperanton minimume iom, havas pli da tempo en nuna komplika situacio, sed ankaŭ viaj familianoj kaj geamikoj. Do proponu al ili lerni Esperanton, trovi, kio je ĝi estas interesa. Proponu al ili ekzemple korespondan kurson de ĈEA, kie ne nepre oni devas konsulti pere de poŝto, sed same eblas konsulti pere de interreto aŭ skajpo. Sed kompreneble vi povas proponi ankaŭ vin mem, por prezenti al ili ion el Esperanto, ekz. tiel kiel vi mem Esperanton lernis.

Kaj por amuziĝi vi povas spekti E-filmetojn kaj aŭskulti E-muzikon, kiun vi trovos ne nur ĉe jutuba kanalo, kaj se vi rigardos retpaĝaron de ĈEA, vi povas trovi tie ekz. kantojn de Miroslav Smyčka, trovi filmetojn el lasta konkurso pri kiu ni skribas en tiu ĉi numero de Starto. Kaj je retpaĝaro esperantobrn.cz ĉe fejsbuko ni ankaŭ klopodos prezenti al vi diversajn interesajojn. Retajn librojn vi trovos ĉe <http://esperantobrn.cz/malnova/bitlibroj.html>.

Nun permesu al mi propran rememoron. Mi ŝatas muzikon kaj ofte mi hejme aŭskultas ankaŭ tiun esperantan. Unu el miaj kompaktdiskoj estis de Ĵomart kaj Nataŝa kun kanto *Ĉu vi volas danci?*. Kiam miaj tiam malgrandaj filinoj ofte aŭdis tiun frazon, demandis, kion tio signifas. Mi tradukis tion al ili, sed tuj kaptis tion por klarigi regulojn por demando en Esperanto kaj diris, ke kiam al ni iu venus, ili povas demandi Ĉu vi volas teon?, Ĉu vi volas kafon? kaj kelkajn pliajn, kaj ili memoras tion ĝis hodiaŭ.

Do provu ankaŭ vi diversmaniere disvastigi Esperanton, eble nun estas por iu ĝusta tempo, ĝusta motivigo kaj vi povas al tiu homo helpi.

Fine permesu al ni ankoraŭ unufoje deziri al vi firman sanon kaj certigi vin, ke ni tamen en tiu ĉi situacio daŭre laboras, ekz. daŭre kun lokaj kluboj preparas novan ekspozicion kaj inaŭguron de ĝi kaj same nian konferencon en Pardubice.

Libuše Hýblová

RAPORTO PRI INFORMA AGADO DE ĈEA (2)

raportas Pavla Dvořáková

MUZZEA PAĜARO ĈE LA SOCIA RETO IPERNITY

(www.ipernity.com/home/esperanto-muzeo-svitavy) estis fondita en januaro 2011 kaj ĝis nun redaktata de Pavla Dvořáková. La origina bezono estis ligi kaj prui internaciajn kontaktojn kaj diskonigi ankaŭ la urbon Svitavy kaj la regionon. Krome ĝi fariĝis virtuala muzeo kun ĝenerala kleriga funkcio.



En oktobro 2019 ĝi enhavis **64 fotoalbumojn kaj pli ol 2200 multimediajn dosierojn**. Dum la lasta jaro estiĝis **5 novaj albumoj kaj alŝutitaj 177 novaj dosieroj** (inkluzive 15 videojn kaj 12 sonregistraĵojn) Tio estas je ĉ. 40 malpli ol lastjare, tamen la vizitateco restis pli malpli sama. La paĝaro havis ekde la pasinta konferenco **pli ol 15 000 virtualajn vizitantojn kaj sume ekde sia fondiĝo pli ol 161 000**. Laŭ la statistiko plu kreskas nombro de vizitantoj-nemembroj de IperNity, kiuj trovas la enhavon en la retserĉilo laŭ ĝia priskribo. Tiel la origina kleriga kaj diskoniga celo komencas esti plenumata. La dosierojn krom tekstoj povas rigardi ankaŭ nemembroj de IperNity, la senpage registriĝintaj povas ĉion ankaŭ elŝuti. Estus dezirinde, se pli da ĈEA-membroj ekkutimus vizitadi la paĝaron kaj uzi ĝin ĉu individue, ĉu en la kluboj.

PAĜOJ ĈE FACEBOOK

1. Diskonigon de informoj de IperNity, sed ne nur de ili, prizorgas precipe internacia **Grupo de Amikoj de la Muzeo**, kreita en 2013, kiu kunigas **301 esperantistojn el 40 landoj**. La stato lastjare estis senŝanĝa. Pozitivas pli oftaj kontribuoj de la membroj, ekz. de Karel Vala, Peter Baláž aŭ Teresa Pomorska. La membroj estas aŭtomate informataj pri **novaĵoj**, kiuj estis dum la jaro entute **51**.

2. Klasika **muzea paĝo ĉe Facebook** estis kreita en 2014 de Matěj Nárožný, sekve prizorgita de Pavla Dvořáková. **La paĝon ŝatas 483 kaj sekvas 488 personoj**. La mencienda ŝanĝo estas, ke ekde 2019 ŝi estas nur en pozicio de analizisto, la paĝon plu redaktas Matěj Nárožný kaj Libuše Hýblová. Kvanto de la novaĵoj malaltiĝis el pasintjaraj 50 al ĉirkaŭ **20**, sed la situacio espereble jam stabiliĝis kaj la stato povas sekve laŭbezzone revigliĝi.

3. La plej nova estas **Facebook-paĝo de ĈEA**, nomita **Esperanto.cz**, fondita en julio 2017 de M. Hruška kaj M. Nárožný, Ekde oktobro 2018 redaktas Libuše Hýblová kaj Pavla Dvořáková. **La paĝon "ŝatis" 340 kaj sekvis 350 personoj**. La paĝo aperigis dum la jaro **82 anoncojn**, kio sufiĉe multas. Grandparte temis pri ligiloj al informoj en la ĈEA-retejo.

Pozitivas, ke la informoj tiel pli atingas ankaŭ eksterlandajn legantojn, kiuj ne ricevadas ĈEA-Retkunikojn. Laŭ la statistiko bedaŭrinde nur 5-10% personoj, kiujn atingas la informo, malfermas kaj supozeble legas ĝin (kun escepto de gravaj aranĝoj – ekz. de la

ĈEA-kongreso, kie la reago estas ĉirkaŭ 35%). Tio estas tamen ofta fenomeno en Facebook. Ĉiukaze necesas ankoraŭ esplori la realan efektivecon de la aktivado aŭ esplori vojojn de ĝia plibonigo.

ĈEA-Retkomunikoj

La plej malnova informilo, neregula amasretletero fondita de Petr Chrdle en 2001, servas nun plejparte kiel referenca trarigardo de multmediaj novaĵoj. Post demisio de M. Hruška en oktobro 2018 plene prizorgis Pavla Dvořáková.

Same kiel en la antaŭa jaro, aperis **tri numeroj**, unu el ili kun la teknika helpo de M. Hruška. Indus fari enketon kaj analizon de la utileco de la retligilaro kaj ĝian uzadon, ĉar la statistiko ne montras ĝojigajn ciferojn. Laŭ la rezultoj montriĝus, ĉu en la nuna formo la komunikilo entute plu funkcios aŭ ĝi iamaniere ŝanĝiĝos. La adresaro de ricevantoj restas la sama – **318 ricevantoj el Ĉeĥio kaj 68 el eksterlando**.

Dankon al ĉiuj vizitantoj, sen kiuj la informa laboro ne havus sencon.

Pliaj interesitoj, diskonigantoj kaj kontribuantoj nepre bonvenas.

La 14-a Mediteranea Esperanto-Semajno en "Les Issambres"

29.2.2020 - 7.3.2020

Pro la korona-viruso *covid-19* kelkaj rezignis sian partoprenon. Venis esperantistoj el Francio, Belgio, Hispanio, Svedio, Italio, Finnlando kaj Rusio. Kun Katerina Arbekova el la urbo *Novosibirsk* venis grupeto da gejunuloj, kiuj kun granda entuziasmo ĝuis kaj praktikis Esperanton.

La programeroj proponis diversajn ludojn, arkopafadon, kvizon, malstreĉigan gimnastikon, loterion, minigolfon, diversajn ekskursojn, dancadon kaj aliajn amuziĵojn.

Okazis kvar diversnivelaĵoj pri Esperanto. Oni vizitis la urbojn *Frejus* kaj *Roquebrune-sur-Argens*. Iuj individue veturis al *Saint Tropez*, kiu distancas nur dek kilometrojn de *Les Issambres*. Pro la pluvo kaj la forta vento la vizito al la lagetoj *Villepey* ne povis okazi. Tiam estis proponataj diversaj tabloludoj kun la intenco pliprofundigi la konon de Esperanto. En la urbeto *Biot* ni vizitis vitrofabrikon. Dum la libera posttagmezo ni povis ludi kartojn aŭ promeni en la ĉirkaŭaĵo. Ĉe la marbordo en salono *Batterie* estis interesa ekspozicio pri la aviadilisto, esploristo kaj verkisto *Antoine de Saint-Exupéry*, kiu loĝis en la regiono. En la loka ĵurnalo *Var-Matin* aperis artikolo pri nia aranĝo kun komuna foto.

Vespere ni ĝuis gitar-koncerton de Mikaelo Bronštejn, Nina Korĵenevskaja montris belajn bildojn de la pentristo Konstantin Vasilyev (1942-1976), kaj kun Nina Cvileneva ŝi prezentis al ni la urbon *Ufa* kaj ties folklorajn ensemblojn. Pri la urbo *Volgograd* prezentis filmon Tatiana Vtorova. Raïta Pyhälä rakontis pri la artisto Yrjö Saarinen kaj montris liajn pentraĵojn. Gunar Olson prezentis al ni bildojn pri sia kolekto de cent tri akordionoj kaj interese parolis pri ili. Ángel Garcia per filmo invitis nin al la ĉi-jara hispana kongreso, kiu okazos en majo en la pitoreska urbeto *Comillas* proksime al *Santander*.

Liba Gabalda

Na pomoc výuce jazyků

Následující text je určen pro učitele cizích jazyků, ale měli by ho znát i esperantisté.

Známka z cizího jazyka mnohdy kazí vysvědčení žákům, kteří nemají nadání na jazyky. Od školního roku 2013/2014, kdy byla povinně zavedena výuka druhého cizího jazyka, je tento problém ještě více zvýrazněný. Pro žáky, kteří jsou schopni s obtížemi zvládnout jeden cizí jazyk, je další cizí jazyk nad jejich síly. Pro mnohé žáky, kteří mají spíš technické nadání, je angličtina většinou větším strašákem než matematika. Ani moderní učebnice a nové efektivní výukové metody nepřinášejí podstatnější zlepšení této situace.

Pro usnadnění a zrychlení výuky cizích jazyků byl v letech 2018-2019 zpracován projekt financovaný Evropskou komisí z programu Erasmus+ pod názvem „Urychlovač mnohojazyčnosti“. Cílem projektu byla příprava výukového materiálu pro půlroční předmět, ve kterém se žáci co nejrychleji naučí mluvit cizím jazykem, v tomto případě esperantem. Možná toto poslední slovo ve vás vyvolalo dojem, že se spíš jedná o „medvědí službu“ než o skutečnou pomoc k usnadnění a urychlení cizojazyčné výuky. Předpokládám, že následující popis projektu a jeho výsledků vás přesvědčí o opaku.

Asi první otázka, která vás napadne, zřejmě bude: „Kdo bude tento předmět vyučovat?“ V projektu je počítáno s tím, že předmět budou vyučovat učitelé cizích jazyků, kteří sice neznají esperanto,

ale mají zkušenosti s výukou jazyků. Proto je pro ně připraven portál s didaktickým materiálem, který budou s jistým předstihem studovat společně s žáky a který jim pomůže výuku zvládnout. Tyto materiály maximálně využívají moderní informační technologie. Novinkou je generátor otázek, které tvoří počítačový program a žáci denně dostanou otázky sestávající jen ze slov a gramatických prvků, které se dosud učili.

Projektu se zúčastnili spolupracovníci z Chorvatska, Slovinska, Bulharska, Německa, Slovenska, Dánska a Irska, celkem 7 partnerů včetně dvou univerzit. Z prvních tří jmenovaných zemí se projektu zúčastnily také čtyři učitelky se svými třídami. Předmět Urychlovač mnohojazyčnosti (originální název v esperantu je Multlingva akcelilo) vychází z tzv. Záhřebské metody. Jejím autorem je Zlatko Tišljar, který na základě zjištění četnosti výskytu morfémů v různých textech v esperantu došel k závěru, že 467 morfémů pokryje kolem 90 % textů. Pro výuku je v projektu vybrána přibližně polovina těch nejčetnějších, konkrétně 242 morfémů, které tvoří asi 80 % textů, případně mluveného jazyka. Z nich je možné utvořit tisíce slov pro každodenní použití. Morfémy jsou v esperantu neměnné a libovolně kombinovatelné a navíc mohou tvořit samostatná slova. Protože se žáci nebudou učit nic navíc, bude stačit pro výuku jeden školní rok. Hlavním účelem není zvládnutí esperanta, ale využití jeho propedeutické hodnoty pro výuku dalšího cizího jazyka a urychlení jeho zvládnutí (asi o 25-30 %).


Kromě dvou hodin týdně ve škole se žáci budou učit interaktivně. Denně dostanou desítku otázek, na které budou odpovídat písemně. Tak si budou procvičovat probranou látku, aby ji nezapomněli a používali jazyk denně. Většina cvičení je vázána na portál, takže žáci budou muset jak ve škole, tak doma používat počítač, případně tablet.

V rámci projektu se uskutečnila zkušební výuka v měsících března až června 2018 ve třech školách ve Slovinsku (Šentjil), v Chorvatsku (Záhřeb) a v Bulharsku (Vraca). Výuku vedlo pět učitelů cizích jazyků (z toho tři angličtinářky), které neznaly esperanto, jak je předpokládáno v projektu a bylo řečeno výše. Výuku absolvovalo celkem 40 žáků. Zprávy se zkušenostmi učitelů – co během kurzu dobře fungovalo, co méně a s čím byly problémy – byly probrány na setkání všech partnerů v Bratislavě 20. a 21. září 2018. Podle toho pak byl definitivně upraven didaktický materiál pro výukový program.

Zkušební výuka asi třetiny ročního (64 hodinového) kurzu, určeného pro devítileté žáky třetí třídy základní školy, prověřila, že je možno dosáhnout cíle, který byl v projektu vytyčen. Bylo konstatováno, že kurs s nadšením přijali jak žáci, tak rodiče i učitelé a všichni měli zájem ve výuce pokračovat, i když s tím nebylo v projektu počítáno. Po ročním kurzu žáci získají schopnost urychlení cizojazyčné výuky, budou prakticky užívat jazyk, a tím získají jasný přehled o gramatických strukturách všeobecně. Budou disponovat více než 100 slovy

pocházejícími z latiny, což pomůže při výuce evropských jazyků s latinským pozadím, jako je angličtina a románské jazyky. Na rozdíl od didaktik, které učí velké množství materiálu (1000-2000 slov) a téměř celou gramatiku, a které obvykle dosahují výsledky jenom pasivní znalosti jazyka, ale ne schopnosti mluvit jazykem během jednoho roku, Urychlovač mnohojazyčnosti vyvíjí didaktické prostředky pro výuku schopnosti mluvení.

Informace o projektu byly průběžně uveřejňovány v loňských číslech zpravodaje Eůropa informilo, z kterých vychází tento popis. Závěrečná fáze projektu se týkala vypracování detailní platformy s instrukcemi, jak používat tento didaktický materiál (s aplikací nejmodernějších informatických prostředků) v šesti jazycích partnerů a postupně bude přeložena do dalších jazyků. Nyní se s tímto materiálem můžete seznámit na mnohojazyčném výukovém portálu esperanta Lernu! Čeština mezi těmito jazyky zatím není, ale je k dispozici ve slovenštině: <https://lernu.net/sk/instruado>.



S dotazy, názory nebo připomínkami se na mě můžete obrátit na:

jvojesp@gmail.com.

Josef Vojáček

Aŭtoro de la opero Sternenhoch premiita!

Ivan Acher, aŭtoro kaj komponisto de la opero Sternenhoch, unua opero en Esperanto, ricevis la 7an de marto la plej elstaran premion en Ĉeĥa respubliko *Český lev* (Ĉeĥa Leono) pro la muziko farita por la filmo *Hodinářský učeň* (Horloĝista lernanto). Ni gratulas!

La opero Sternenhoch mem ricevis premion de ĉeĥaj teatraj kritikistoj en la kategorio Muziko por la jaro 2018. Unua prezentado de la opero Sternenhoch estis la 7an de aprilo 2018. Ankaŭ preskaŭ du jarojn vi havas eblecon spekti la operon en Esperanto, plej proksime la 7an de majo, 23an kaj 25an de junio.

52-a Malferma Tago de UEA kaj TEJO – nuligita!

Sabate la 25an de aprilo 2020 estis esperantistoj invitotaj de UEA kaj TEJO viziti Centran oficejon de UEA, sed pro kron-viruso la Malferma Tago ne okazos.

Ne enuu, sed aŭskultu kaj legu!

Se vi estas fermitaj hejme pro kron-viruso, vi povas tamen distri vin kaj samtempe ekzerci Esperanton per aŭskultado de Esperanto-Radioj aŭ per legado de bitlibroj:

[Pola retradio](#) – [Esperanta retradio](#) – [Radio Vatikana](#)

[Esperanta literaturo](#) – [Sumoo](#) – [Ekzercu](#)
– [Lernu](#)

Filmkonkurso „Mia asocio, mia urbo“

En septembro 2019 Universala Esperanto-Asocio kun Ĉina Radio Internacia (ĈRI) lanĉis la filmkonkurson „Mia asocio, mia urbo“. La filmkonkurso okazis omaĝe al la 55-jariĝo de la esperanta disaŭdigo de ĈRI kaj ties celo estis diskonigi E-asociojn en diversaj lokoj de la mondo samkiel la lokajn kulturaĵojn de la urboj, kie situas la E-asocioj. La limdato por partopreni en la konkurso estis fino de la jaro 2019 kaj ĝis tiam alvenis 35 filmoj pri 30 urboj kaj asocioj el 15 landoj de kvin kontinentoj. Kaj nun fine de februaro venis rezultoj. En la konkurso partoprenis ankaŭ du filmoj el Slovakio kaj du filmoj el Ĉeĥio. Filmeto pri Svitavy de Darja Slonova (volontulino de E@I) akiris 4a premion kaj aliaj tri filmetoj ĉi tie menciitaj akiris honoran mencion. La dua ĉeĥa filmeto estis de Pavol Kaščák. Ĉiuj filmetoj estis publikigitaj en la kanalo de UEA ĉe YouTube [UEA viva](#). Ĉeĥajn, slovakajn kaj polan filmetojn vi povas spekti ĉe:

<http://www.esperanto.cz/eo/aktuality/filmoj-de-la-konkurso-de-uea-mia-asocio-mia-urbo.html>

(laŭ Gazetaraj komunikoj de UEA)



SES 2020

Kroměříž 18. – 26. červenec


Letní esperantské studium (Somera Esperanto-Studado), velmi úspěšná akce slovenských esperantistů, se poprvé bude konat v České republice (doufejme, že koronavirová krize do té doby přejde) ve městě Kroměříži.

- Dopoledne bude výuka esperanta
- Odpoledne výlety, přednášky, ruční práce, sport apod.
- Večer budou koncerty a diskotéky



Akce se dosud konala ve městech Nitra a Martin s účastí 200 až 300 lidí, kteří se především přišli zdokonalit v esperantu. Čeští esperantisté mají nyní jedinečnou příležitost zúčastnit se akce v domácím prostředí.

Peter Baláž (Petro)
E@I-kunordiganto
SKEF-prezidanto
<https://ses.ikso.net/>



Jam la dektrian fojon

Dum la dua adventa dimanĉo en decembro 2019 okazis jam la 13-a Marcipana Kristnasko. Denove alveturis Jiří Vyšínka kun siaj filino kaj nepino. Ĉifoje gvidis la modladon Ivana Janková. La aranĝo fariĝis en Svitavy tre ŝatata, kvankam la iamaj unuaj vizitantoj jam elkreskis, sed venas novaj. Entute modlis pli ol 100 infanoj. Fidela restis ankaŭ la urbestro s-ro David Šimek, kiu vizitas la Marcipanan Kristnaskon kun sia familio regule. Aperis ankaŭ gastoj eksterlandaj – Daria Slonova el Rusio kaj Edoardo Nannotti el Italio. Kaj ne mankis eĉ la plej juna ĉeĥa esperantistino, Rozárka Blahušová el Brno kun siaj gepatroj kaj fratineto.



Libuše Dvořáková

Josef Kříž pri Viktor Kaplan

La Bulteneto n-ro 51 (aŭstra gazeto pri numismatiko) alportis biografion de Viktor Kaplan (1876-1934), inventisto de turbino, kaj informon pri moneroj kaj poŝtmarkoj kun lia portreto. La tekston verkis Josef Kříž.

-mm-

Vespero kun teo

Ĵaŭde la 16-an de januaro 2020 en Esperanto-Muzeo Svitavy estis inaŭgurita nova ekspozicio kun la temo „Teo, Amo kaj Mondo“. Per la aranĝo kulminis multjaraj aktivadoj de la loka klubo en la tutmondaj konkursoj. En la 1-a kaj 2-a etapoj de la konkurso aranĝita de ĈRI (Ĉina Radio Internacia) ni akiris plurajn premiojn inkluzive de titolo „La Urbo de Teo“. En la 3-a etapo ni engaĝis nin en la konkurso de fotografistoj. Kiel konkursantojn ni aligis s-anojn Jan Richter, Li Huang, Jana Moláčková kaj Klubon de Esperanto-Amikoj en Svitavy. Nome de ĉiu konkursanto ni sendis 10 fotojn. En la duan rondon avancis 10 niaj fotoj. De tiu konkurso ni ricevis Honor-diplomojn.



La aranĝo kulminis per la ĵaŭda inaŭguro de la ekspozicio de elektitaj konkursaj fotoj el la tuta mondo, per prezentado de aliaj eksterlandaj fotoj, per salutmesaĝoj. Li Huang montris teo-ceremonion kun gustumado de multaj teo-specoj, konatigis la ĉeestantojn kun kultivado kaj prilaboro de teo, kun teo-tradicioj. Antaŭ fermo de la aranĝo ni pentris sur teo-folioj. La pentraĵoj estos senditaj al

Ĉinio, la plej bonaj estos premiitaj. La vesperon stampis agrabla etoso kaj intereso de la aŭskultantoj, kiuj multe demandis kaj Li volonte ĉion respondis. Ni disiris post pli ol tri horoj. Ĉiu vizitanto ricevis ĉinan donaceton por altiri feliĉon en la nova jaro.



La okazaĵon filmis Daria Slonova el Rusio kaj prilaboris kiel kurtan video-filmon.

Libuše Dvořáková

El la recenzo de Sen laco por paco

Mi volis legi ĉi tiun libron en la kadro de la konkurso Sumoo, al kiu mi deklaris, ke mi legos 10 paĝojn ĉiutage, sed post la unuaj 10 paĝoj la afero ne plu funkciis, ĉar la libro estis tiom interesa, ke mi plulegis ĝin ĝis la fino en du aŭ tri tagoj. Cetere, la lingvo, en kiu ĝi estas verkita, estas modela Esperanto; tio, kion la parolantoj vere parolas, flue komprenebla sen bezono pri parnasaj gvidlibroj. ... abunde informas la libro de Petr Chrdle, al kiu mi dankas pro la verkado. *Renato Corsetti en: Monato, marto 2020/3*

Otokar Březina inter betlehemoj

Ekde la mezo de decembro 2019 ĝis fino de januaro 2020 la vizitantoj de la Urba Muzeo kaj Galerio en Svitavy povis rigardi ekspozicion „Otokar Březina – překlady básní aneb dorozumíme se v EU?“ (*Otokar Březina – tradukoj de poemoj aŭ ĉu ni interkompreniĝos en EU?*). Ĝia aŭtoro estas honora membro de ĈEA inĝ. Viktor Dvořák. La tempo de la ekspozicio ne povis esti elektita pli bone. Jarfine okazas en la urbo dum adventaj dimanĉoj diversaj aranĝoj, precipe muzeaj. La kvanto de vizitantoj estas tiutempe plej alta. La ekspozicio pri Otokar Březina estis lokita tuj apud la plej alloga atrakcio – la plej granda betlehemo de Svitavy, longa 15 metrojn. La betlehemo atendas sian rekonstruon, post kiu ĝi estos plene moviĝanta.

Libuše Dvořáková

Gratulo al d-ro Vystrčil

Laŭ propono de L. Chaloupková ĈEA gratulis al senatano d-ro Miloš Vystrčil okaze de lia elekto kiel prezidanto de la Senato. Antaŭ unu jaro li ebligis instali la supre menciitan ekspozicion pri Otokar Březina en la vestiblo de la Senato (Starto 2/2019, p. 60). Viktor Dvořák tiam ricevis diplomon el Pelhřimov pri nova rekordo: li sukcesis trovi la plej multajn tradukojn de Březina al diversaj lingvoj. En la gratulo la asocio dankis al d-ro Vystrčil pro lia helpo kun instalo de la ekspozicio.

-mm-

Diskuto de esperantistoj en lernejo

Kunlaboro de la elementa lernejo Riegrova kaj Esperanto-Muzeo en Svitavy funkcias jam plurajn jarojn. La lernantoj ofte vizitas la muzeon kun sia instruisto Jan Richter. Kelkajn el niaj eksterlandaj gastoj ni invitas viziti la lernejon, por ke la geknaboj povu konatiĝi kun la kulturo de fremdaj landoj kaj utiligi siajn lingvajn sciojn.



Tiel okazis, kiam nin vizitis Edoardo Nannotti el Italio kaj Darja Slonova el Rusio. La lernantoj komparis la instruadon en ĉeĥa lernejo kun lernejo en Rusio kaj Italio. Temis ĉefe pri poentado, pri fremdlingva instruado, pri komenco kaj fino de instruado, pri amplekso de unuopaj lernobjektoj, ekzercado de la angla kun Edoardo k.s.

Ambaŭ gastoj nuntempe laboras kiel volontuloj en Esperanto-Centro en la slovaka urbo Partyzánské. Post diskutado en la lernejo ili rigardis memorindaĵojn de la urbo kaj faris mallongajn videofilmojn.

Libuše Dvořáková

LINGVA ANGULETO

Poznámka na začátek: První část bude v češtině, formou reálné korespondence, aby se v ní orientovali i méně zdatní esperantisté, a hlavně, aby je tato „živá forma“ zaujala. Protože jsme dostali další ohlas (překlad), přidáváme jej v této recenzi na konec pod značkou „L“. Zadané otázky neopakujeme (šetříme místo pro další úkoly), předložte si zadání: *Starto 4/2019, p. 123. M.T.*

Milý příteli Karle – aby téma tohoto LA (s)plnilo svůj cíl, uděláme z toho „dialog“, který bude ve STARTU asi tohoto znění, které dneska píše Tobě. Víím, že na můj ohlas čekáš a že jsi jeden z mála, který mé připomínky (případný nesouhlas) přijme jako rovnocenný nárok na jiný názor a náhled. V tomto dialogu pro STARTO Tvou „figuru“ uvedu pod znakem „KV“, svou – jako „recenzent – „R“.

Hned je zřejmé, že KV využívá svého obvyklého „vorta trezoro“, který má „po ruce“!

Horvath:

KV: *vždy s očima plnými slz*

R: *oči vždy zalité slzami*

Oba překlady jsou významově rovnocenné, ale R. využívá esp. výrazu „*larmobanitaj*“ –

KV: *se zamyšleným výrazem ...řekla s utrápeným výrazem*

R: *zamyšleně... turmentoplene*

KV: *Dobó hlasitě (rámusivě) cválal kolem paláce, podkovy cvakaly o dlažbu*

R: *Dobó cválal kolem paláce, podkovy hlučně klapaly o dlažbu*

Myslím, že slovo „hlučně“ vyjadřuje lépe ten dusný hluk ve vojenském obležení (tuto jemnou nuanci KV nemůže vystihnout, protože knihu nečetl...)

KV: *matka chvátá na místo, zvedá svého synka a oplakává ho*

R: *matka letí na to místo; zvedá svého syna; běduje nad ním...*

(kaj la aŭtoro (G.G.), kaj la tradukisto (J.H.) scias, kiel gravaj estas paŭzoj – interpunkcio (;), por fari la rakonton plendrama. Nur KV tion opinias :“ne grava...“??)

KV: *okamžitě oba prudce vydechují s vyvalenýma očima...*

R: *chvíli oba prudce vydechují, oči vyvalené...*

KV: *vítězství je na dosahvítězství se blíží...*

R: *vítězství je blízko... vítězství se blíží...*

Oba výrazy jsou rovnocenné – ale opakování slova „blízko“ zesiluje ten stav očekávaného vítězství. V knize vojenští velitelé pevnosti Eger nikdy nepovažovali vítězství „na dosah“ – znali zoufalou situaci lépe než vojáci, kteří se opájeli výkřikem: „vítězství je blízko...“ toto je vysvětlení, proč R. volí tento výraz – je to také zdůraznění toho, jak je důležité znát souvislosti.

KV: *nový podnět vzrušuje vojáky (zaujalo je, co se děje)...*

R: *nový podnět dodává vojákům nového bojového ducha...*

KV: *obklopili ho lidé*

R: *...ví, že se v pevnosti v naději „okolo něj (tj. velitele) shromažďovali (al-ar-ígis) vojáci i civilisté (popolo, lidé)...*

KV: *přiblížil se zašpiněný venkovan...*

R: *jakýsi umolousaný ???*

KV: *Vztyk! Všichni, kdo ještě žijí!*

R: *...nebo: Vzhůru.../ Vzmužte se...???*

* * *

Eugene de Zilah:

1. KV: Velitel přístavu mně nezaplátil za poslední měsíc

R: - „- na mně nepožadoval platbu – „- (ne igis min pagi, pagideva= ne pagigis min)

2. KV: Severozápadní vítr byl vhodný pro plachtění (plavbu) jihovýchodním směrem

R: - „- plavbu na východ

3. KV: A. poradil takto: *Vždycky se nejprve postarej o loď, i když ztrácíš ženu. Ztratí-li se loď, je vlastně ztraceno vše – život, žena, majetek; máš-li loď, s ní snadno najdeš novou ženu! Té radě se Lena dobrosrdečně vysmála, protože ji považovala za žert.*

Zde je obzvlášť důležité si uvědomit, že je to životopisná literatura – autobiografie. (Což KV nevěděl). Je to pravdivý příběh osob ze současné doby: život na moři, na bárce. Zde spolu mluví „námořníci“ – chlapi, a ti neříkají: „ztratí-li se“, ztraceno „vše“, „máš-li loď“. LENA je (byla - + 2009) manželka; rada A. je ovšem „neomalená“, žádná žena se tomu „dobrosrdečně“ nevysměje, dotkne se jí to – ale v tu chvíli dělá, že to považuje za žert... Tohle všechno vím já (R), která jsem knihu četla a její protagonisty znám osobně. Vzhledem k tomu to překládám trochu (nikterak podstatně) jinak. Necht' mi KV laskavě tento „chyták“ promine!!

R: *A mi radil: Vždycky se nejprve postarej o loď, i kdybys měl ztratit ženu. Jestli ztratíš loď, ztratíš vlastně všechno – život, ženu, majetek. Jestli máš loď, novou ženu najdeš snadno... Lena se té radě s humorem zasmála, raději dělala, že to považuje za žert...*

4. *Poháněl nás lehký západní větrík...*

5. Zde vzniká velmi humorná situace, které R. vděčí za to, že může přijít na řadu určitá gramatická regule. Nejprve ovšem překlad:

- Mi prenis min por olda marhundo -

KV: *Hlasoval jsem pro starého tuleně (?) nebo staral se o něj (té větě vůbec nerozumím...)*

R. *Považoval jsem se za starého „mořského vlka“ (tuleně)...*

Milý KV, není divu... i já si teprve nyní všímám, jak běžná je v literatuře (en fremlanda, ne en la ĉeĥa) tato vazba. Z nově vydané knihy LA FIDO (la slovendevena aŭtoro Vinko Oŝlak, vyd. KAVA-PECH 2019) jsem vybrala několik příkladů použití tohoto pravidla:

... la gazeton Slovenski vestnik, kiun la eklezio prenis por komunisma gazeto...

...altrudis novan ateisman religion, kiu sin mem ne prenas por religio...

...ke la mondo... fakte ekzistas; kial do ni tiel banalan konstaton prenu por la baza premiso?...

... neni el ili povas konstati sin viktimo de iluzioj... neni prenis sin por viktimo de iluzioj...

- což vše odpovídá českému: považovat se, mít se

Já sama používám: „Mi opinias min stultulo“, ks.

6. KV: *Pak jsme se na lůžku v naší kajutě chovali jako nezletilí...*

R: Milý KV, já nepoznávám to „neviňátko“, které neví, co v kajutě dělají dospělí lidé – ale jistě ví, co by „nezletilí“ dělat neměli...

Já to vím, proto překládám: *Pak jsme se na lůžku v naší kajutě chovali jako zamlada..*

7. KV: *Kvůli silnému jižnímu větru byl přístav nevhodný. (Na tak silný jižní vítr nebyl přístav stavěný).*

R: *Při silném jižním větru nebylo možno v přístavu vydržet.*

8. KV: *Bylo nutno ihned odejít.*

R: - „- vyplout -

9. KV: *Bylo by nutno ihned odejít*

10. R: - „- vyplout, odplout...

Značka „L“:

Horvath:

1. *Stále s očima zalitýma slzami*
2. *Se zamyšleným výrazem – Řekla s utrápeným výrazem*
3. *Dobó jak dusající kuň přepádil palác*
4. *Matka letí na místo; zvedá svého syna; běduje nad ním*
5. *Během minuty oba funí s vykulenýma očima*
6. *Triumf se blíží – Triumf se přibližuje*
7. *Nový pramen vzpružuje vojáky*
8. *Kolem něj se shlukl lid*
9. *Přiblížil se umaštěný venkovan*
10. *Vzhůru všichni, kdo žijete!*

Eugene de Zilah:

1. *Velitel přístavu mi dovolil neplatit za minulý měsíc*
2. *Severní vítr byl dobrý pro plachtění na východ*
3. *„Starej se vždy nejdřív o loď, i když přijdeš o manželku. Pokud loď přijde vniveč, vše je ztraceno – život, manželka, majetek. Pokud máš loď, díky ní vždycky najdeš novou manželku.“ Lena se zasmála radě, kterou raději považovala za žert*
4. *Vlahý větřík nás strkal západně*
5. *Vzal jsem se za starého mořského vlka*
6. *Poté na posteli naší kajuty jsme dováděli*
7. *Při silném jižním větru je přístav neudržitelný*
8. *Bylo záhodno hned odejít*
9. *Nevím...?*
10. *Je nutno hned odejít*

Rimarko: Jenan parton de LA ni havu en Esperanto. Ne eblas alimaniere, ĉar ĉiujn fragmentojn de la teksto mi prenis el esperanta literaturo de la hungara deveno. Endas prezenti la aŭtoron: **Istvan Nemere**, nuntempa ege fruktodona

verkisto (en la hungara kaj en Esperanto). La ekuzita verko „Historio de Hungario – kroniko de 989 jaroj“ estas origine en la hungara. Ne dubinde: la verkon kreis beletristo. Ĝi estas buntkolora teksto, fonto de spritaj esprimoj, vortumoj, taŭgaj kunmetaĵoj. Tial la saman gloron meritas la tradukisto **Jozefo Horvath**. Mi spertis, ke mi ne havas ĉemane pli sukan helpilon por trakti gramatikon kaj stilon ol ĉi tiun libron (kompreneble oni ne evitu verkojn de aliaj eminentuloj).

Jen gustumo: ANEKDOTO (atentu – „anekdoto“ ne estas tio kion opinias plimulto da legantoj; rigardu en vortaron!

Pro diversaj kialoj Géza elektis la okcidentan Kristanisman, t.e. Romon. Malgraŭ tio en lia kortego plu vivis la pagana spirito; eĉ okazis jeno: la enfiltrigintaj ĉi tie enposteniĝintaj kristanaj pastroj foje demandis Géza en la duka kortego, kial li oferas ĉiam plu al la malnovaj dioj, se li jam konvertiĝis al Kristanismo. Nia Géza levis la ŝultrojn kaj respondis: „Mi estas sufiĉe riĉa por oferi al du dioj.“

Jen kelkaj utilaj vortumoj:

- Simple vortumite –
 - li forcedis impostojn –
 - revui la armeon –
 - punkelo –
 - en la strikta senco de la vorto –
 - nombre malpliiginte –
- „Kio ŝuldiĝas, tio ŝuldendas“

Bonan ĝuadon de la nuna LA ...

M.T.



**Výsledek hospodaření ČES za rok 2019, plán na rok 2020
a přehled o majetku, pohledávkách a závazcích (v Kč).**

Příjmy	pl.2019	sk.2019	pl.2020	
Příspěvky na běžný rok	13 000	15 760	13 000	Přehled o majetku, pohledávkách a závazcích k 31.12.2019 peněžní prostředky pokladna korunová 300 pokladna eurová 0 ceniny 0 účet Fio 100 účet Fio spořicí 477 056 peníze celkem 477 456 <i>změna vůči 31.12.2018 14 742</i> investice podílové listy 180 098 investice celkem 180 098 <i>změna vůči 31.12.2018 1 710</i> pohledávky UEA subkonto 0 pohledávky celkem 0 <i>změna vůči 31.12.2018 -1 848</i> ostatní majetek ČES drobný majetek v ceně pořízení 208 567 knihy v libroservu (odhad) 9 486 ostatní majetek ČES celkem 218 053 <i>změna vůči 31.12.2018 -388</i> závazky UEA subkonto 6 839 platby pro UEA 720 závazky celkem 7 559 <i>změna vůči 31.12.2018 5 406</i> účelově vázané prostředky fond Tilio 27 392 fond ediční 12 660 fond Cigno 22 697 sekce nevidomých 20 279 klub Mladá Boleslav 16 421 klub Ratíškovice 8 246 klub Karlovy Vary 7 697 pedagogická komise 5 100 klub Havířov 2 712 klub Písek 2 599 klub Česká Lípa 2 215 klub Benešov 1 557 klub Tábor 1 246 klub Přerov 1 076 klub Vítkovice 838 klub Opava 800 ost. kluby a sekce bez pr. os. 1 315 celkem 134 850 <i>změna vůči 31.12.2018 8 888</i>
Příspěvky dobrovolné	1 000	0	0	
Příspěvky na budoucí rok	25 000	23 129	25 000	
Dary členů	10 000	15 440	10 000	
Dary nečlenů	2 000	0		
Dotace	10 000	0	25 000	
Starto předplatné	0	332	0	
Konference a sjezdy	100 000	145 566	100 000	
Činnost klubů a sekcí bez PS	2 000	0	2 000	
Muzeum	0	0	0	
Libroservo	4 000	16 129	4 000	
Kurzy esperanta	2 000	3 520	2 000	
Příspěvky UEA ind. běžný rok	0	6 156	0	
Příspěvky UEA ind. bud. rok	0	41 049	0	
Platby UK na běžný rok	0	4 773	0	
Platby UK na budoucí rok	0	11 520	0	
Platby ILEI a pedagog. komise	900	1 180	900	
Úroky z účtů	500	1 602	1 500	
Virtuální adresa	200	0	200	
Příjmy celkem	170 600	286 156	183 600	
Výdaje	pl.2019	sk.2019	pl.2020	
Starto tisk	17 000	17 272	18 000	
Starto distribuce	17 000	15 418	18 000	
Konference a sjezdy	100 000	159 164	100 000	
Činnost klubů a sekcí bez PS	5 000	0	5 000	
Administrativa, kancel. potřeby	2 500	1 675	2 500	
Jízdné funkcionářů	5 000	298	5 000	
Přísp. na stravné za schůze	700	200	700	
Muzeum	20 000	6 630	20 000	
Libroservo nákup zboží	4 000	15 741	4 000	
Libroservo poštovné a balné	300	0	300	
Kurzy esperanta	200	72	200	
Příspěvky UEA ind. běžný rok	0	6 156	0	
Příspěvky UEA ind. bud. rok	0	41 049	0	
Platby UK v běžném roce	0	4 773	0	
Platby UK na budoucí rok	0	11 520	0	
Platby ILEI a pedagog. komise	800	1 029	800	
Kolektivní členství v UEA	1 500	1 173	1 500	
Kolektivní členství v EEU	1 300	0	1 300	
Blahopřání, kondolence	1 000	1 182	1 500	
Poplatky	50	220	50	
Daň z úroku	100	304	300	
Nový majetek	30 000	0	50 000	
Závazky k sam. klubům	0	0	0	
Ceniny	0	0	0	
Výdaje celkem	206 450	283 876	229 150	

La 18a Novjara Renkontiĝo en Wiesbaden

27.12. 2019 - 3.1. 2020

Post unu jaro denove okazis en la junulara gastejo de Wiesbaden renkontiĝo por bonvenigi kaj festi Novan Jaron kun geamikoj. La eventon ĉeestis iom pli ol du cent geesperantistoj el diversaj partoj de la mondo. De pli malproksime venis partoprenantoj el Israelo, Kanado kaj Koreio. La striko de la francaj fervojoj kaŭzis malfacilaĵojn por tiuj, kiuj intencis alveni trajne el Francio. Samtempe kaj samloke okazis la 11-a NIS (Novjara Internacia Semajno) por infanoj kaj gejunuloj, kiuj povis ĝui abundajn programerojn.



Post la bonvenigaj vortoj de la ĉeforganizanto Lu Wunsch-Rolshoven dum la interkona vespero ni povis gustumi diversajn frandaĵojn alportitajn de la partoprenantoj. Jam la sekvan tagon okazis la urbo-gvidado tra Wiesbaden, kiu konigis al ni la plej vidindajn lokojn. Dum la semajno eblis viziti glaci-sketejon, muzeon, termobanejon, bahaan templon aŭ ĝui la Novjaran promenon.



La programo estis riĉega kun altnivelaj prelegoj kaj interesaj diskutrondoj. En diversaj prelegoj oni pritraktis klimaton, mediprotektadon, ekologion, kio fakte estis la kadra temo. Okazis diversaj Esperanto-kursoj kaj serio da lingvaj temoj. Prelegoj *Kiel prezenti Esperanton al pli ol cent infanoj*, *Kiel iĝi poligloto: teknikoj pri lingvaj interŝanĝoj*, pri *Sensuala plezuro de la prononco*, *Malĝustaj asertoj pri Esperanto*, *Rilatoj inter lingvoj kaj matematiko* allogis la esperantistojn.



Estis prezentata la Esperanto-kulturo tra 50 jaroj de Literatura Foiro. Ni ankaŭ eksciis kial la francaj poldevenuloj jubileas, kiel Eŭklido inventis matematikon kaj pri aliaj matematikaj misteroj. Oni parolis pri la vivkvalito, pri sana manĝado, pri kolesterolo, pri bicikloj kaj arto. Eblis sperti ĵongladon, sorobanon, rubikkubon, ĉigongon, malstreĉigan gimnastikon aŭ ĉeesti Sukuro-kurson de unua helpo.

Ĉiutage okazis diskutoj pri diversaj aktualaj temoj. *La nova silka vojo*, *Virinaj rajtoj*, *Rusia ekspansio*, *Financado en politiko*, *Klimataj ŝanĝoj – ĉu koŝmaro aŭ oportuno*, *Katalunio/Hispanio*, *Skotlando/Britio*, *du modeloj de sendependiĝo*. Krome interesis prelegoj *La Luno: 50 jaroj post la unua paŝo sur ĝi*, *La egi-*

pta vojaĝo al la transa mondo, 20 jaroj de Reta Vortaro, Leonardo kaj Rafaelo, kiu superis kiun?, Kulturaj diferencoj inter Eŭropo kaj Azio.



Iuj interesiĝis pri dutaga seminario *Ĉu vi volas pravi aŭ feliĉi?* bazita sur la procezo SenPerforta Komunikado (SPK). Kolektiĝis ankaŭ amikoj de Esperanto-Land. Estis prezentata la venonta UK en Montrealo kun diversaj planitaj ekskursoj. Bicikla vojaĝo portis nin de Tromsø al Porto.



Okazis tablo-tenisaj turniroj, verkado de poezio, kantado, muzikado, israelaj dancoj, zumba, biergustumado, vortludoj kaj kvizoj. Ne mankis manlaboroj, fabrikado de ornamaĵoj, trikado de polpetoj kaj aliaj aĵoj... En la halo estis instalita

kesto por libroj alportitaj de partoprenantoj, kiujn oni povis libervole preni aŭ interŝanĝi.

Estis prezentataj diversaj filmoj, pup-teatraĵo pri Aleksandro kaj la mekanika muso, japana teatro Kamiŝibajo, fotoj el pasinta NoRo, Novjara koncerto de diversaj artistoj. Vesperan koncerton prezentis "Inicialoj DC".

Libroservo proponis multajn librojn kaj aliajn esperantaĵojn. Je dispono estis diversaj tabloludoj kaj puzloj. El ruĵoj kolektitaj ekstere infanoj faris diversajn artaĵojn. Krome ili spertiĝis pri origamio, feltumis, faris bildojn el diversaj semoj, plektis braceletojn kaj ŝatis frandi ĉokoladajn bananojn.

Post la Silvestra bufedo ni bonvenigadis diversajn Novjarojn kaj dancis ĝis frumateno. Estis prezentataj kantoj por la Festivalo de la Paco, organizata de Unesko, kiu okazos la 19-an de septembro 2020 en Tolosa (Hispanio). La tekstoj devas esti tradukitaj al unu el la kvar laborlingvoj, inter kiuj estas ankaŭ Esperanto.

Dum la Internacia vespero ni spektis ĵongladon, ĝuis kantadon, dancadon, akrobataĵojn kaj aliajn kontribuadojn, prezentataj de niaj ĉiuaĝaj talentuloj. Post la vesperaj programeroj interbabilado daŭris en gufujo. Ĉe la fino de la aranĝo sursceniĝis ĉiuj kontribuintoj de la diversaj programeroj kiujn oni dankis per forta aplaŭdo. Dum la tuta semajno regis agrabla Esperanto-etoso.

La 18-a NoRo estis sukcesa, ĉiuj entuziasme kunlaboris kaj promesis veni jarfine denove en la saman lokon por komune amuziĝi kaj ĝui la semajnon.

*Liba Gabalda
kunlaboris Floreal Gabalda*

Printempa renkontiĝo de EK Ŝumperk

Anoj de EK Ŝumperk elkore invitas vin al tradicia printempa renkontiĝo, kiu ĉi-jare okazos la 16an de majo. Post kelkaj jaroj ni denove revenos rekte en la urbon Ŝumperk, kie ni faros ne longan promejon, sed eĉ tra tri parkoj! Poste ni vizitos en la jaro 2016 rekonstruitan fajrobri-gadan domon.



Tagmanĝo kaj posttagmeza programo okazos en proksima penziono Rotunda, kie interesatoj eĉ povas mendi tranokton kaj ĝui nian regionon ankoraŭ dimanĉe (ekz. migri en Jeseníky aŭ ĝui varman akvon en Termobanejo Velké Losiny).

Kio okazis ĉe EK Praha?

23/01/2020 – rememoriga vespero pri Stanislava Chrdlová okaze de la 20-a datreveno de ŝia forpaso (klubejo)

06/02/2020 – lingva seminario de Margit Turková (klubejo)

20/02/2020 – diskuto kun Petr Kotyk el Muzeo de la Nacia Literaturo (klubejo)

05/03/2020 – prelego de Jindřich Košťálek pri Brazilo (klubejo)

EK Prostějov

La 6-an de februaro 2020 okazis kluba jarkunveno.



Estis elektita kluba komitato: Jaroslav Liška (*prezidanto*), Jiří Kincl (*kasisto*) kaj Jitka Hanáková (*revizorino de budĝetoj*).

Libro pri Petro Den

kun mencio pri Esperanto

Eldonejo Libri Prohibiti eldonis libron de eseoj de Ladislav Radimský (409 p.), konata sub pseŭdonomo Petr Den. En 1935 aperis esperantlingve lia libro *Kiel fariĝi kreanto facile kaj rapide* kaj en 1938 Verda Stacio elsendis prelegon *Petro Den laŭdas la nunan krizon*. La redaktoroj de la libro en la postparolo dankas al esperantistoj Marie Čumová kaj Miroslav Malovec, kiuj helpis al ili akiri informojn pri tiuj esperantlingvaj verkoj, menciitaj en almetita kompakta disko kun biografio de la verkisto.

-mm-

KONFERENCO DE ĈEA EN PARDUBICE

Konferenco de Ĉeĥa Esperanto-Asocio okazos ĉi jare la 9an ĝis la 11an de oktobro en Pardubice. Pardubice estas bone trafike atingebla regiona kaj universitata urbo kun pli ol 90 mil loĝantoj. La urbo situas en orienta Bohemio ĉe kunfluo de riveroj Labe kaj Chrudimka.



Nia konferencejo

Unua skriba mencio pri Pardubice devenas el la jaro 1295, kiam tie papo Bonifaco la 8a fondis monaĥejon kaj preĝejon de Sankta Bartolomeo. La urbo pli famiĝas, kiam ĝin aĉetis la nobela familio Pernštejn. Tiam ekestis urbo kun firma fortikaĵo, kiun ekde la jaro 1560 posedis ĉeĥa reĝo. En la unua duono de 19a jarcento estis konstruita fervojlinio Prago-Pardubice-Olomouc, kaj en la dua ekestis tie multaj fabrikoj, ekz. fabriko de muelmaŝinoj, sukerfabriko, bierfarejo kaj rafinejo de mineraloleoj. Post unua mondmilito disvolviĝis en Pardubice kemia kaj elektronika industrio kaj post dua mondmilito la urbo fariĝis ĉefurbo de tiama Orientbohemia regiono, kio influis ankoraŭ pluan evoluon de la urbo. Ankaŭ nuntempe estas la urbo ĉefe industria.

La urbo havas ankaŭ riĉan kulturan kaj sportan vivon – en la urbo estas profesia

teatro kaj Kamera filharmonio, okazas sportaj konkursoj, la plej fama, eĉ en la mondo, estas ĉevalvetkura konkurso [Velká pardubická](#), aranĝata ekde la jaro 1874.

Famega estas ankaŭ speciala mielkuko de Pardubice, kiun vi havos eblecon gustumi dum nia konferenco, kiu okazos en Studenthejmo kaj lerneja manĝejo Rožkova 331, Pardubice.

Pliajn informojn ni publikigos en venonta numero de Starto komune kun aliĝilo kaj invitilo al nia membrarkunsido. Aktualaj informoj aperos ankaŭ en nia retejo www.esperanto.cz en ambaŭ lingvaj versioj.

POEMKONKURSO

Jam sesan fojon okazas poemkonkurso, en kiun invitas vin italaj esperantistoj partopreni. Partopreno en la konkurso estas senpaga, senlima – ĉiu rajtas partopreni – kaj la temo estas libervola. Verku aŭ en Esperanto aŭ en la itala. Ĉiu aŭtoro rajtas sendi nur unu poeziaĵon ne pli longan ol 50 versoj. La poemon vi sendu retpoŝte kun plenumita aliĝilo ĝis la 30a de aprilo 2020. Poste la poemojn ricevos anonime juĝantaro konsistanta el verkistoj kaj literaturaj kritikistoj. Krom tri premioj, kiuj estos aljuĝitaj, ĉiu partoprenanto ricevos la verkaron en pdf versio, post kiam ĝi estos preta kaj eldonita. Ĉiuj poemoj estos tradukitaj en tiun lingvon, en kiu ili ne estis verkitaj kaj aperos en la eldono en ambaŭ lingvaj versioj. Pliajn informojn kaj aliĝformularon vi trovos ĉe:


<https://www.iconcorsidisamideano.it/poezio-el-ciuj-cieloj-sesa/>.

Novajoj de la eldonejo KAVA-PECH

Pri du gravaj verkoj eldonitaj en la jaro 2019, nome la verko de Bertha von Suttner *For la batalilojn!* kaj de Petr Chrdle pri la vivo kaj verko de Bertha von Suttner *Sen laco por paco* aperis anonco en la lasta Starto (p. 119) kaj Jindřich Košťálek skribis pri ili en la lasta numero de Bulteno de EK Praha. Lian tekston mi do nun kompletigas nur aldonante la kovrilpaĝojn.




Plia eldonaĵo de la jaro 2019 estas jam la tria eldono de la furora libro de Leif Nordenstorm ĉarme kolore ilustrita de Pavel Rak *Arne, la ĉefido*, kun la subtitolo *Rakonto el la vikinga epoko*. Temas pri aventura historia rakonto el sveda vilaĝo de la jaro 829. La unua eldono de tiu libro gajnis la premion de UEA *Infanlibro de la jaro*. Krom la nuna luksa eldono restas ankoraŭ kelkaj ekzempleroj de la dua pli modesta eldono kun molaj kovrilpaĝoj kaj nigro-blankaj ilustraĵoj, kompreneble senteble




pli favorprezaj.

La lasta eldonaĵo de KAVA-PECH en la jaro 2019 estis *La fido* de Vinko Ošlak, aŭtoro de pli ol 40 libroj, tradukisto kaj predikanto, kiu en tiu sia lasta ampleksa eseo prezentas alian rigardon al la kristana kredo, ol al kiu oni al kutimiĝis.



La unua libro eldonita en ĉi tiu jaro estas esperantigo fare de Zdeněk Pluhař de la origine ĉeĥa verko de Radka Dvořáková *Perrefleksa terapio kiel memhelpo* kun la subtitolo *Kion tuŝi se io min doloras*. Siajn spertojn la aŭtorino prezentas en la formo de kompreneblaj instrukcioj, kiel oni povas helpi al si mem de pluraj malsanoj kaj doloroj. La teksto estas kompletigita je multaj koloraj klarigaj bildoj.


La ĝis nun lasta verko, eldonita en Esperanto, estas ankaŭ esperantigo de la ĉeĥa originalo, *Tri knaboj, Krepuskulino kaj Terurulo* de Eva Vychodilová, esperantigita de Petr Chrdle. Ĝi celas infanojn inter kvar kaj naŭ jaroj. Temas pri fabelo, en kiu tri knaboj – amikoj – post aventuraj travivaĵoj ekscias, ke ne ĉiu malbono devas esti malbona, sed iu povas esti eĉ por io bona. Ĉarmaj koloraj



ilustraĵoj de Miroslava Zezulová estetike kompletigas la fabelon.

Kaj *Arne*, *la ĉefido*, kaj *Tri knaboj*, *Krepuskulino* kaj *Terurul* estas avantaĝaj por komencantoj, ĉar KAVA-PECH eldonis ankaŭ iliajn ĉeĥajn versiojn, do eblas kompari ambaŭ tekstojn.

Mi aldonas ankoraŭ unu ĉeĥan libron, nome la verkon de Vlastimil Novobilský



pri sia patro *Jaroslav Novobilský*, kun la subtitolo *Muž, který povýšil morální principy nad strach ze smrti*. (Viro, kiu levis moralajn principojn super la timon antaŭ la morto.) Mi prezentas ĝin ĉi tie ne nur

pro tio, ke la aŭtoro estas meritplena esperantisto, sed en la libro estas pluraj mencioj pri Esperanto, kaj krome la temo devus plu rezoni precipe inter ni esperantistoj. J. Novobilský estis pedagogo, esperantisto kaj en la milito ĉefo de la loka taĉmento de la nacia liberiga movado, kiu estis kaptita kaj murdita en la koncentrejo Mauthausen.

Pli da informoj pri la paĝnombroj, prezoj (inkluzive de la rabatitaj prezoj de la libroj en Esperanto por la membroj de ĈEA) kaj pli detalajn priskribojn vi trovos ĉe <https://kava-pech.cz>

Petro Chrdle



Josef Pokorný kun
Pavel Polnický

Josef Pokorný – 100 jara

Okaze de lia jubileo mi vizitis lin en Domo de pensiuloj en Hořice v Podkrkonoší, kie li vivas en bela 1-lita ĉambro. Mi gratulis al li nome de KELI-familio kaj transdonis al li novan Bibliion (lia jam estas tre difektita de la ĉiutaga legado) kaj libreton Preĝo por ĉiu tago. Lia psika kaj korpa stato estas enviinda. Li nur malbone aŭdas. Dum la pli ol trihora mia restado li multe rakontis pri sia vivo kaj familio kaj mi notis kaj esperantigis almenaŭ parton de tio:

Mi naskiĝis 1. 2. 1920 en Hořice v Podkrkonoší en loka kastelo, kie loĝis miaj gepatroj kun 4 jara frato. Mia patrino estis vendistino kaj patro estis seruristo. Li estis alvokita militservi kaj nur post kelkaj tagoj en Italio blindigis lin eksplodo. Post la restado en mal-sanulejo en Graz kaj en blindula centro en Brno li revenis al Hořice. Liberan tempon li dediĉis al muziko (violono kaj gitaro) kaj ankaŭ komencis lerni de s-ro Munzar Esperanton. Do, mi kiel knabo ankaŭ komencis ludi tiujn instrumentojn kaj malrapide ankaŭ mi fariĝis esperantisto. Gepatroj estis membroj de Libera reformita eklezio (nun Eklezio frata) kaj mi estis edukita en kristana medio. Mi vizitadis bazan kaj mezan lernejon en Hořice kaj komencis labori en Liberec kaj poste mi revenis al Hořice kaj tie mi pli ol 30 jaroj laboris en maŝinfabrika kiel prizorganto de necesaj materialoj por laboristoj. Tutan vivon mi aktivis en eklezio kaj membris en ĉeĥa sekcio de KELI.

Pavel Polnický

Acta Historica 2019/12

Silezia Universitato en Opava eldonas ĉeĥlingvan gazeton Acta Historia. En la lasta numero 2019 aperis artikolo de Vlastimil Kočvara *Z historie esperant-ského hnutí v Československu – Spolek Regiona Esperantista Ligo* (El historio de Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio – Societo Regiona Esperantista Ligo). Post ĝenerala informo pri la movado sekvas detala priskribo de REL, kiu ekde 1930 aktivis en Ostrava-Těšín. Krom alia agado ĝi postlasis monumentojn en Bohumín kaj Ostrava-Zábřeh.

Diplomo pri Elstara Arta Agado



En UK Lahti 2019 estis atribuita al Miroslav Malovec diplomo pro la esperant-lingva opero Sternenhoch. La diplomo mem venis nur en januaro 2020.

Nova poŝtmarko

Ĉeĥa Poŝto eldonis poŝtmarkon A kun portreto de poeto Ivan Blatný 1919-1990 laŭ grafikisto P. Dvorský. Por ni ĝi estas interesa pro tio, ke Blatný kiel knabo estis esperantisto. La kluba kroniko de Brno fieras pri lia subskribo en 1931 kaj pri lia deklamado de propraj poemoj dum la decembra Zamenhof-tago. En la unua artisma horeto de Verda Stacio la 1-an de marto 1933 li recitis poemon Verda Stelo de Stanislav Schulhof. Samjare en Ligilo aperis lia poemeto Somera Vespero. Ankaŭ lia onklo Josef, komponisto, lernis Esperanton.

Unesko-kuriero 4/2019



Aperis la kvara numero 2019 de Unesko-kuriero kun ĉefa temo *Kiam instruisto estas alvokiĝo*.

La gazeto priskribas specialan instruadon en Mont-realo, Kongo, Valparaiso, Ĉinio, Barato kaj aliaj landoj de la mondo. Ankaŭ restaŭradon de Inkaa pendanta ponto, fotojn de forgesita fotisto, malkovritan vrakon de sklavŝipo, historion de infana soldato.

La gazeto estas senpage elŝutebla ĉe la UEA-retejo: <https://uea.org/>

AMO-seminario en Nov-Zelando



Aktivula Maturigo (AMO) de ILEI okazis januare 2020 en Nov-Zelando por aktivigi la movadon en Oceanio. Ĝi donis diversajn rekomendojn: disvastigi maorian kulturon per Vikipedio, utiligi filmojn de Youtube, engaĝiĝi en ekologiaj movadoj, okazigi lingvajn seminariojn, evoluigi allogaĵojn por junularo ks.

ILEI okazigas similajn seminariojn en diversaj landoj tra la mondo.

Nova retejo por ELF-AREK

La kutimo krei kolektojn estiĝis en Esperantujo praktike ekde la Dua Libro de Zamenhof. Sed baldaŭ oni ne plu limigis sin al la libroj. Je la iniciato de individuoj, E-grupoj kaj asocioj, ekaperis esperantaj glumarkoj, bildkartoj, vizitkarto, kalendaroj k.m.a. Esperantistoj komencis arigi ilin kaj, ekde 1912, ankaŭ poŝtajn stampojn, poŝtmarkojn kaj ĉiajn oficialajn filatelaĵojn, kiuj kunportas ion pri Esperanto. Tiuj specialaj esperantaĵoj, kun ŝtata agnosko, aparte atingas multajn neesperantistojn: la filatelistojn.

Esperantaĵoj tra pli ol cent jaroj registris iniciatojn, helpis diskonigi la lingvon kaj pluvivigis la nomojn de aktivuloj, kiuj dediĉis sin al "la afero". Tial la esploroj, kiujn faras kolektantoj, povas utili al Histori-amantoj.

Esperanto-Ligo Filatelista / Amika Rondo de Esperantaĵ-kolektantoj, faka organizo kunlaboranta kun UEA, de pli ol 50 jaroj kunigas interesatojn pri la plej diversaj kolektofakoj per sia regula informilo "La Verda Lupeo".

La nova, refasonita retejo de ELF-AREK estas plena je bele ilustritaj artikoloj kaj estas alirebla al ĉiuj esperantistoj, kiuj ŝatas esperantaĵojn.

Ĝi troviĝas ĉe la adreso:

<http://kolektado.esperanto.cc>

En ĝi oni trovas ankaŭ formularon por sendi komentojn kaj demandojn, kiujn bonvenigas aktivuloj de la organizo.

Elda Doerfler (Italio), prezidantino
James Rezende Piton (Brazilo),
retejestro

Aŭskultu voĉlegitan verkon

Nun estas nove je via dispono plua voĉlegita verko **Kun blanka bastono** verkita de en nia medio tre fama kaj konata ĉeĥa blinda esperantisto Rudolf Krchňák. La kolekton de 18 skizoj kaj enkodukon voĉlegis s-anoj Vladimír Türk kaj Jaroslava Malá, biografion de Krchňák s-ino Ivana Karašová, kiu kun sia edzo dum multaj jaroj voĉlegas ĉeĥan e-brajlan gazeton Aŭroro.

Jen estas la ligilo:

<https://1drv.ms/u/s!AgzvtmJnEASAo2fKZw-kUQ50eMxh?e=FJaEjCnino>

Dankon al ĉiuj kaj agrablan aŭskultadon.

Jan Přiborský

Blindulsekcio ĉe ĈEA

Por sinjoro imperiestro

Decembre 2019 aperis en Bystřice pod Hostýnem nova publikaĵo *Za císaře pána*. Esperantistino Olga du Temple, naskita en Bystřice kiel Valentová, poste vivanta en Brno, kun kies E-klubo ŝi daŭre korespondas, kvankam ŝi loĝas dum jardekoj en Kanado, trovis rememorojn de sia patro Anděloslav Valenta pri liaj travivaĵoj dum la unua mondmilito.

La teksto jam estis paliĝinta, preskaŭ nelegebla, tamen s-ino du Temple ĉiutage enkomputiligis du paĝojn kaj rezulton sendis al Zpravodaj (Informilo) de la urbo Bystřice pod Hostýnem. Nun la rememoroj aperis kiel la 17-a publikaĵo de la redakcio kaj kostas 100 Kč.

<https://www.bystriceph.cz/nova-publikace-vysla-v-edici-zpravodaje-mesta-bystrice-pod-hostynem/d-9443>

mm

KLUBA VIVO

Přerov: La 4-an de decembro 2019 okazis antaŭkristnaska renkontiĝo kun 18 partoprenantoj, ankaŭ el Olomouc kaj Hranice.



Olomouc: Sabate la 7-an de decembro 2019 okazis antaŭkristnaska renkontiĝo, partoprenis ĈEA-prezidantino kaj reprezentantoj el Pardubice. Oni kantis ĉe gitarludo.



Prostějov: La 27-an de decembro 2019 silvestran renkontiĝon vizitis 16 personoj, ankaŭ reprezentantoj el Olomouc kaj Šumperk kaj ĈEA-prezidantino. Oni gitarludis, kantis popolajn kaj esperantlingvajn kantojn kaj dancis ĉe reproduktita muziko.



Brno: La 5-an de februaro 2020 la kluba jarkunveno (16 personoj) unue rememoris la unuan datrevenon de forpaso de Věra Podhradská, poste estis tralegitaj *Raporto pri agado 2019* (M. Malovec) kaj *Ekonomia raporto* (B. Trzosová) kaj informo pri kluba ret-butiko (M. Kolka).



Svitavy:

■ dimanĉe 8. 12. 2019 jam la 12-a Marcipana Kristnasko en Esperanto-Muzeo, kun partopreno de pli ol 100 infanoj.

■ ĵaŭde 16. 1. 2020 sub gvido de Libuše Dvořáková la klubo organizis te-ceremonion kaj ekspozicion pri teo por la publiko de Svitavy

■ sabate 8. 2. 2020 membrokunveno de la klubo kaj 4. 3. 2020 nova kunveno, kiu elektis komitaton: Libuše Dvořáková, Miroslav Sýkora kaj Li Huang.

Esperanto konata – nekonata

historia-regiona vespero

Ĵaŭde la 20-an de februaro 2020 en salono de biblioteko Třinec okazis prelego de d-ro Petr Majer, kronikisto en Bystřice nad Olší, kaj gasto Karel Karpecki, esperantisto kaj kronikisto de Hřava.



Temo estis disvastigo de Esperanto kaj Esperanto-societoj en kronikoj de Třinec- kaj Jablunkov-regionoj, persekutoj en la 1950-aj jaroj kaj rememoroj de s-ano K. Karpecki.



D-ro Majer mem ne estas esperantisto, sed li okupiĝas pri esperantistoj en Třinec kaj kolektas materialojn por sia kroniko.


Pri s-ro Karpecki aperis artikolo jam en marto 2018 en la ĵurnalo *iDnes -Ostrava a Moravskoslezský kraj* sub titolo *Li scias neniun mondlingvon. Sed kun homoj de diversaj landoj li interkompreniĝas per Esperanto.*

Ankaŭ nun la 80-jara esperantisto rememoris pri malnovaj tempoj al atentemaj aŭskultantoj.



Rimarkigo:

Necesas aldoni, ke en Landa Arkivo en Opava estas jam kolektitaj multaj materialoj pri esperantistoj en la regiono, kio povas inspiri samideanojn ankaŭ en aliaj regionoj.



-mm-

Dudeka jubileo de „Rondeto de Doktoro Hradil“

En januaro de la jaro 2000 fondiĝis „Rondeto de Doktoro Hradil“. La ideo aperis post kongreso ĈES en Tábor. La inicianto – Míra Vaněk proponis doni realan formon al agado sur kampo de Esperantujo al kvar entuziasmaj personoj – anoj de Asocio de Handikapitaj Esperantistoj:

MUDr. Josef Hradil, posedanto de pensio Espero en Skokovy, kunfondinto de tiu ĉi asocio kun Josefo Vaněček – lernanto de li, gastiganto de famaj seminarioj aranĝitaj dufoje jare – printempe kaj aŭtune, famkonata esperantisto, eldonanto de la gazeto Verda Familio, kreinto de medicina vortaro kaj honora ano de UEA kaj ĈES kaj Jagellona universitato.

Jindřiška Drahotová – hospitala flegistino, instruanto de du aliaj anoj de la Rondeto kaj pluraj studentoj en lernejoj kaj gimnazioj en urbo Mladá Boleslav. Tradukanto el originaj esperantaj verkoj kaj eldonanto de „Legolibretoj“.

Miroslav Vaněk – junulo, aktiva kreema motoro.

Miroslava Ascherová – junulino, uzanto de Esperanto, pasia vojaĝantino, fervojistino.

Tiuj kvar homoj allogis aliajn homoj al diversaj aranĝoj en Esperantujo por neformala aktiva partopreno. Post morto de d-ro Hradil en la jaro 2008, aktive laboris Eva Pánková, Milada Kolářová, Pavel Brom, Eva Novotná, Blanka Hužerová kaj pluraj aliaj. En Skokovaj seminarioj kreiĝis kolektivo de fidelaj amikoj de la lingvo el diversaj lokoj de la respubliko kaj ankaŭ el eksterlando.

Nun post dudek jaroj okazos la 50-a seminario en marto 2020, unue en alia loko.

Dum tempo infanoj el bazaj lernejoj kaj studentoj de gimnazioj maturiĝis, foriris studi, aŭ realigi planojn de siaj vivoj, la rondeto evoluis plu, maljuniĝis, trankviliĝis.



Nun, la Rondeto – parto de ĈES kaj ankaŭ de AEH, funkcias kiel regula, neformala „Klubo Klementinka“, en bela bone ekipita „Komunitní centrum“ fondita de la urbo Mladá Boleslav. La homoj, kiuj frekventas kunvenojn, estas kursanoj el la jaro 2017 en urba biblioteko, kiuj aliĝis post simpla afiŝo en biblioteko. Kaj venas ankaŭ tiel nomataj „amikoj de Esperanto“ por partopreni prelegojn pri esperantaj aferoj. Venu eĉ vi.

Januaro 2020, Drahotová.

Koresponda Servo de Japana Esperanto-Instituto

KS de JEI peras korespondadon inter japanaj kaj eksterlandaj korespond-dezirantoj. Se vi interesiĝas pri korespondo kun japanoj, bonvolu turni vin al: Koresponda Servo de Japana Esperanto-Instituto, Sinzuyuku-ku, Waseda-mati 12-3, Tokio, Japanio

Indiku vian aĝon, sekson, profesion, interesojn kaj preferojn.

Rememore al Stanjo

La 23an de januaro okazis en la klubejo de Praga Esperanto-Klubo rememorigo al Stanislava Chrdlová, inter esperantistoj konata kiel Stanjo, kiu forpasis pro kancero fine de januaro 2000, do antaŭ 20 jaroj, en la aĝo de 45 jaroj. Mi projekciis du rilatantajn filmojn: La unua montris fragmentojn de ŝia riĉa Esperanto-vivo, la dua la lastan adiaŭon kun ŝi en la ĉefpreĝejo de la Ĉeĥoslovaka husana eklezio sur la Malnovurba placo en Prago. En ambaŭ filmoj ni povis vidi ankaŭ multajn ĉeĥajn kaj eksterlandajn samideanojn, kiuj ankaŭ ne plu estas inter ni. Do ilia rememorigo estis iuspeca flanka efiko de ambaŭ filmoj.



Instruistino en Lančov 1990

Dum la lasta adiaŭo akompanis Stanjon per kantado Miroslav Smyčka kaj la funebran paroladon havis Renato Corsetti, tiutempa vicprezidanto de UEA kaj nia proksima amiko; en la ĉeĥan interpretis Jindřich Ondráček. En sia parolado li resumis la ĉefajn meritojn de Stanjo ene de la Esperanto-movado, la Ĉe-metodan instruadon de Esperanto dum mallongaj kursoj ne nur en Ĉeĥio (ekzemple en Lančov), sed ankaŭ eksterlande, ekzemple en San Marino kaj Koreio,

prezentadon de moravia folkloro ene de multaj Esperanto-aranĝoj, kompiladon de folkloraj programoj, ekzemple de la tutsemajna oficiala antaŭkongreso en Brno *Moravia folkloro al la mondo* antaŭ la UK en Prago en 1996 kaj de la Nacia vespero en la UK, ŝian brilan ĉiĉeronadon, ofte ankaŭ por esperantistoj, ŝiajn verkojn kaj prelegojn, ktp. Lia parolado estis bona resumo de la agadoj de Stanjo, kiun oni povis vidi antaŭe en la jam menciita filmo.



Fine de tiu konciza teksto pri mia edzino mi petas tiujn, kiuj konis ŝin, dediĉi al ŝi mallongan rememoron en ĉi tiu malgaja ronda jubileo.

Petro Chrdle

JUBILEANTOJ DE JANUARO, FEBRUARO KAJ MARTO 2020

Božena Glončáková, Vrbno pod Pradědem
Antonín Hillebrand, Rychnov u Jablonce
Ing. Max Hillebrand, Dolní Černá Studnice
Jiří Hron, Pardubice
Petr Janeba, Choceň
Zdeněk Jiráček, Praha
Pavla Keclíková, Novosady
Miroslava Kosnarová, Pardubice
Mgr. Olga Lacinová, Větrní
Doc. Marie Lipoldová, Csc.
Dáša Macíčková, Veřovice
Josef Nejman, Rychnov nad Kněžnou
Ladislav Němec, Frýdek-Místek
Prof. Vlastimil Novobilský, Ústí n. Labem
Jiří Pěnek, Kašperské Hory
Ludmila Smolová, Jablonec n. Nisou
RNDr. Jaroslav Suchánek, Ostrava
Ing. Arch. Anna Vyšínková, Vracov

Al la jubileantoj ni deziras firman sanon,
kontenton kaj ĝojon en iliaj pluaj jaroj!

Vlastimil Novobilský – 85



Honora membro de ĈEA,
emerita rektoro de Univer-
sitato Purkyně en Ústí nad
Labem, prof. Vlastimil
Novobilský, naskiĝis la
15-an de februaro 1935 en

Melč apud Opava. Ĉe Karola Univer-
sitato kaj ĉe Ĥemia-teĥnologia Alt-
lernejo en Prago li studis fizikan ĥemion,
poste laboris ĉe Esplor-instituto de
Neorganika Ĥemio en Ústí nad Labem.
En la sama urbo ekde 1968 li aktivis ĉe
ĥemia katedro de la pedagogia fakultato
kaj ekde 1995 kiel rektoro de loka uni-
versitato Purkyně.


Lia patro Jaroslav, murdita de nazioj,
estis aktiva esperantisto. Ankaŭ Vlasti-
mil aktive eklaboris en la movado jam
kiel studento kaj trovis tie sian vivpart-
nerinon. En 1959 li edziĝis al Věra
Kořínková, filino de esperantista poeto
Jiří Kořínek. Ili havas du filinojn, unu
studis farmacion, la alia agrikulturon.

Prof. Novobilský kompreneble verkis
multajn fakajn verkojn en la ĉeĥa, sed
nin interesas precipe lia laboro por-
esperanta. Ĝi konsistis el kursoj kaj
prelegoj kaj precipe skribaj tekstoj, kiujn
ni povas legi ankaŭ nun. La plej gravaj:
Skizo pri la Esperanta literaturo
(1956), **Komenio kaj la internacia
lingvo** (1974 – kun O. Kníchal), **Česká
literatura v esperantu** (1983), **Fran-
tišek Vladimír Lorenc** (2017), **Jaro-
slav Novobilský: Muž, který povýšil
morální principy nad strach ze smrti**
(2019 – pri sia patro).

Kun sia edzino li tradukis libron de
Chava Pressburger **Taglibro de mia
frato** (2005 – pri Petr Ginz).

Lian aktivadon kompletigas multaj arti-
koloj en gazetoj kaj prelegaroj, funkcioj
en diversaj organizoj.


-mm-



Inĝ. Jiří Vencľ

(* 28.2.1936; † 31.1.2020)

La Esperanta klubo „Amikeco“ en Česká Třebová perdis sian multjaraŭn aktivan membron inĝ-**on Jiří Vencľ**. Li mortis neatendite antaŭ sia 84-a naskiĝdatreveno. Li naskiĝis en Česká Třebová, kie li vizitadis bazlernejon kaj teknikajn mezlernejon. En Prago li sukcese finis studadon en Fervoja Altlernejo. Dum la tuta vivo li laboris en diversaj postenoj ĉe fervojo.



Kun Esperanto li konatiĝis en E-klubo en sia naskiĝurbo en la jaro 1969. De tiu tempo li regule vizitadis la klubon kaj aktive partoprenis ĝiajn aranĝojn. Li estis dumviva membro de Ĉeĥa Esperanta Asocio, membro de IFEF, AEH, KELI kaj IKUE. Krom sia riĉa aktivado inter esperantistoj li vikle partoprenis kulturalan vivon en Česká Třebová – li aktoris en loka amatora teatra trupo kaj marioneta teatro. Li aktive partoprenis ŝakludajn konkurojn, volonte skikuradis en ĉirkaŭaĵo de la urbo kaj en proksimaj Orlicaj montaroj kaj Jesenikoj. Estis eble vidi lin ankaŭ inter turistoj. Lia granda amo estis gimnastikado en loka „Sokol“-grupo. Li partoprenis spartakiadojn kaj poste gimnastikajn aranĝojn de „Sokol“-organizo.

Lia persona vivo kaj riĉaj dumvivaj aktivadoj estis taŭge prezentitaj dum la ceremonio en loka funebra templo, kiun partoprenis familianoj, multaj liaj konatuloj kaj esperantistoj el diversaj lokoj de nia lando.

Ladislav Kovář

Ni kondolencas

■ La 31-an de januaro 2020 forpasis **Mgr.**



Libuše Obláta Horňanská (94 jara), kateĥistino, fratino de Franciskana sekulara ordeno en Brno-Husovice, membrino de Schönstatt-movado kaj servistino en Koinótés.

■ La 7-an de Marto 2020 mortis multjara mem-



brino de Esperanta Klubo „Amikeco“ en Česká Třebová **Miloslava Čechová**. Ŝia bonhumoro, afableco kaj helpopreteco estis granda subteno por nia klubo. Restu en paco.

Ladislav Kovář

Inaŭguro de nova ekspozicio en Esperanto-Muzeo en Svitavy

Kvankam vi havas ankoraŭ sufiĉe da tempo por spekti nunan ekspozicion pri 50-jariĝo de ĈEA kaj pri ĉeĥa junularo, ni volas informi vin, ke venonta inaŭguro de la ekspozicio en la Esperanto-Muzeo kun la temo Gravaj internaciaj Esperanto-aranĝoj en la mondo, okazos la 5an de septembro 2020. La inaŭguron partoprenos kroataj esperantistoj el la urbo Bjelovar, do ni planas por ili tritagan programon ekde vendredo ĝis dimanĉo kaj invitas vin ankaŭ partopreni. Ni loĝos en studenta hejmo, prezo estos ĉirkaŭ 300 kronoj po nokto kaj el la programo ni elektas ekzemple sabatan koncerton de bjelovaraj esperantistoj. Do pripensu la partoprenon kaj anoncu vian intereson partopreni laŭeble plej frue al cea@esperanto.cz, por ke ni sciu kiom da lokoj por tranokto mendi.

-lh-

Jak platit svazu

Fio banka Svitavy

Platit lze poštovní poukázkou A (poplatek 36 Kč do 5000 Kč) nebo převodem na účet **2800186228/2010**, **variabilní symbol** má celkem 10 míst - prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie a doplněné vpředu nulami, např. 00325). Číslo legitimace je uvedeno na štítku při expedici Starta. Dalších pět míst pro variabilní symbol podle účelu platby (viz seznam). Pokud platíte za klub (EK nebo sekci), uveďte své číslo legitimace a pošlete na emailovou adresu Vrat. Hirše seznam, za koho platíte.

Seznam čísel:

(ukončení variabilního symbolu)

- 06940 členství ČES
- 06941 členství UEA
- 06942 předplatné Starta bez členství
- 06943 dary ČES a mimořádné čl. příspěvky
- 06944 poplatek UK
- 06945 kongres EEU
- 50400 komise pedagogická ILEI
- 50401 písemný kurs začátečníci
- 50402 písemný kurs pokročilí
- 50404 Paroliga kurso
- 50405 svazové zkoušky
- 50800 sekce nevidomých LIBE
- 50900 sekce zdravotníků UMEA
- 51000 sekce křesť. esp. KELI,
vlastní b. ú. 211 768 239/0300
- 51100 sekce katol. esp. IKUE,
vlastní b. ú. 2700247564/2010
- 51200 sekce informatiky
- 70100 komise pro tisk a inf.
- 80200 ediční fond
- 80300 propagace v tisku
- 80400 fond Tilio
- 80500 virtuální *adresa@esperanto.cz*

Předplatné časopisů

Předplatné časopisů zajišťuje Pavel Polnický, Lidická 939/11, 290 01 Poděbrady, polnickypavel@seznam.cz, tel. 723 672 335. Předplatné uhradte na účet u **Equabank**, č. ú. **101 953 9617/6100**, konst. symbol 0379 a variabilní symbol uvedený u jednotlivých titulů. Pokud platíte jednou položkou za více časopisů, pošlete P. Polnickému rozpis platby.

Monato: 1320,- Kč, v.s. 07001, 12 čísel ročně, 36 stran formátu A4, rete 820,-Kč

Juna Amiko: 350,- Kč, v.s. 07004, 4 čísla ročně, 40 stran formátu A5, rete 190,-Kč

Literatura Foiro: 1220,- Kč (*800,- Kč), v.s. 07005, 6 čísel ročně, 56 stran formátu A5 (*cena v závorce platí pro členy "Esperanta civito".)



50-a Lingva Seminario,
okazonta ĉi-foje ne en Skokovy,
sed en la hotelo Kavka
en **Malá Skála** u Turnova
en la tagoj **26. – 29. 3. 2020**.

nuligita pro kron-viruso!

Periodikum Českého
esperantského svazu, z.s.
51. ročník

Redaktor: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,
starto@esperanto.cz
http://www.esperanto.cz/starto

Předplatné v Česku
(bez členství ve svazu): 200 Kč

Členská evidence a změny adres:
p/a Vratislav Hirš, Ruprechtov 117,
683 04 Drnovice,
vratislav.hirs@esperanto.cz,
tel. 517 444 117

Uzávěrka příštího čísla: 7. 5. 2020

--

Organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio
51-a jarkolekto

Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj
aŭ rekte ĉe nia Asocio

Abonprezo: 11 eŭroj, ekster
Eŭropo 13 eŭroj

(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)

elektronika versio PDF 6 eŭroj

Redaktoro: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,
Ĉeĥio, starto@esperanto.cz

http://www.esperanto.cz/starto

Presis: DTP centrum, Svitavy

Redakto-fermo de la sekva
numero: 7. 5. 2020

ISSN 1212-009X

Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.; 15.11.

KALENDARO 2020

2020-05-16 Printempa Renkontiĝo en
Šumperk, Info: libusehyblova@seznam.cz

2020-06-21 Tradicia Grimpo al Granda
Ĉantorio, Info: suchanekj@seznam.cz

2020-07-18/26 Somera Esperanto-Studado en
Kroměříž, Retejo: ses.ikso.net



2020-08-14/16 Renkontiĝo de Eksaj Tendaranoj
en Lančov, Info: let.lancov@seznam.cz

2020-09-05 Inaŭguro de nova ekspozicio en
Esperanto-Muzeo en Svitavy
Info: cea@esperanto.cz

2020-09-25/27 Konferenco de Ĉeĥa Fervojista
Esperanto-Asocio en Beroun, cefea@centrum.cz

2020-10-9/11 Konferenco de ĈEA en
Pardubice, Info: cea@esperanto.cz

Eksterlande

2020-05/31-06/01 Transponta German-Pola
Kongreso en Frankfurto/Oder - Słubice, Retejo:
www.esperanto.de/gek/2020



2020-05/29-06/05 La 72-a IFEF-Kongreso en
Frankfurto/Oder - Słubice

Info: ifefesperanto@gmail.com

2020-06-04/11 Baltiaj Esperanto-Tagoj, Info:
margarita.zelve@gmail.com

2020-06/27-07/04 Internacia Kongreso de
Blindaj Esperantistoj en Moskvo, info:
svsmetanina@yandex.ru

2020-08-01/08 La 105-a Universala Kongreso
de Esperanto en Montrealo (Kanado), Retejo:
www.esperanto2020.ca

2020-08-08/15 La 70-a KELI-Kongreso en
Legnica (Pollando), Info: pomer@wp.pl

2020-08-22/29 Itala Kongreso de Esperanto,
retejo: <https://kongreso.esperanto.it/87/>

Pliaj informoj en Esperanto.cz, Eventoj.hu
kaj Eventaservo.org



La betlehemo de Svitavy apud la ekspozicio pri Otokar Březina



Nia konferencio en Pardubice aŭtune 2020



Gastoj Darja Slonova el Rusio kaj Edoardo Nannotti el Italio en nia muzeo akompanataj de Marek Blahuš kaj Václav Zouzalík



Rememore pri Stanjo



ĈEA-vicprezidanto Jiří Tomeček kaj pliaj ĈEA-membroj dum la tradicia E-mentala aranĝo BESTĜARDENO en Prago (29. 2. 2020)



Jarkunveno en Brno